

Migrado al la valo La Sagne

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 566, 1974.08.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La starigo de la sekretario de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds estas por ni okazo prezenti al vi tiun ĉi urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon. Dum la pasintaj semajnoj vi konstatis, ke la ĵurasa montaro ofertas agrablajn migradeblecojn, ke por la pluvaj tagoj interesaj muzeoj pretas malkaŝi trezorojn pri la horloĝ- kaj aŭtomat-industrio. Hodiaŭ ni vizitigos al vi fromaĝejon.

A.- Tiu vizito nepre efektiviĝu matene, tagon kiam la kursoj de Internacia Feria Altlernejo ne okazos. La vizitemuloj rendevuas en la stacidomo, kaj per ruĝa trajneto ili forlasas la urbon La Chaux-de-Fonds por iri al la najbara vilaĝo La Sagne. Plaĉa vojaĝo tra arbaroj kaj paŝtejoj.

Cl.- En La Sagne oni povas elekti inter la vizito de du fromaĝejoj. Tio atestas, ke la lakto-produktado estas la ĉefa mongajno de la kamparanoj. Estas fabrikataj grandaj fromaĝoj malmolpastaj kun truetoj. La svisoj bone distingas tiun fromaĝon sub la nomo Ĵuraso, dum la eksterlandanoj donas al ĝi la nomon **Grujero**, al kiu ĝi ege similas.

A.- Inter la sepa kaj oka horoj alvenas la kamparanoj. Ili alportas la lakton de la mateno. En granda kaldrono jam atendas la lakto de la antaŭa vespero. La lakton la fromaĝisto pesas, antaŭ ol ĝin fluigi en la vastan kaldronon, kie ĝi estos iom post iom varmigita dum sernĉesa movigado. Estas interese scii, ke la temperaturon la fromaĝistoj mezuras laŭ la Reomura gradado. Antaŭ ol iri matenmanĝi la fromaĝisto verŝas giston en la lakton. La lakto kazeiĝos kaj restos tiucele iun tempon je mezvarma temperaturo.

Cl.- Estas la momento ĵeti rigardon al la vilaĝo. La flamgotika preĝejo altiras la atenton. Kial ne ripozi en ĝi aŭskultante muzikiston. Kaj el la sonorilejo oni havas belan panoramon super tiu tipe ĵurasa vilaĝo, kiu senfine etendiĝas laŭ longa valo. 5 stacidomoj haltigas la ruĝan tejneton en la diversaj kvartaloj de tiu longega vilaĝo.

A.- Nun venis la momento reiri al la fromaĝejo. La fromaĝisto tranĉas la kazeiĝintan laktaĵon per fajnegaj metalaj fadenoj. Kaj per tuko li ĉerpas la duonon de tiu kazeo el la kaldrono. Vinĉo permesas levi la pezan tukon, el kiu fluadas la selakto. Helpe de relo ĉe la plafono la fluanta kazeo estas kondukata al formo. La fromaĝisto premas en la formon la kazeon kun la tuko. Ree elfluas la selakto.

Cl.- Simila agado permesos rikolti la alian duonon de la kazeo. Ĉiutage kvar ĝis ses similaj fromaĝoj estas fabrikataj. Ili ripozas en la formo dum duontago.

A.- Pumpilo fluigas la selakton al krem-eltirilo. El tiu kremo oni fabrikas la fromaĝejan buteron. La reston de la selakto la kamparanoj venas serĉi por la nutrado de la porkoj.

Cl.- Vizito de la keloj ankaŭ estas instrua. Plurajn tagojn la fromaĝoj flosas en ege sala akvo. Tiel ili iom post iom akiras la salecon, kiu ilin karakterizas.

A.- Poste la fromaĝoj ripozas sur bretoj. Kaj dufoje en la semajno la formaĝisto devas ilin lavi kaj turni. Tio ne estas eta afero, ĉar ili pezas proksimume po tridek kilogramojn.

Cl.- Oni povas rimarki, ke dum sia du aŭ trimonata restado en tiu kelo la fromaĝoj firmiĝas kaj maldikiĝas. Poste ili migros al alia fromaĝejo, kie ili estos finflegataj.

A.- Estas interese viziti ĵurasan farmdonon. Sub la sama tegmento troviĝas la loĝejo de la kamparanoj, la stalo kaj giganta fojnejo. Ĉar la kamparanoj ne plu povas kalkuli je la helpo de salajratoj, ili sin ĉirkaŭis de maŝinoj. Estas ĉiam impresige viziti stalon, kie viciĝas dudeko aŭ eĉ trideko da brutoj.

Cl.- Somere la bovinoj ofte paŝtas ĉirkaŭ la farmdomo, dum la bovido kaj bovidinoj restadas en la komunuma paŝtejo. Dufoje en la semajno la kamparanoj promenadas en tiu vastega herbejo duonarbara al la serĉado de sia brutaro. Estas interese scii, ke la brutoj de sama stalo malforte disiĝas. Ili malmulte migradas en la paŝtejo.

A.- Por konkludi tiun viziton al fromaĝejo kaj farmdomo ne estas pli taŭga manĝo ol fonduo akompanata de blanka vino.

Cl.- Kaj por la digestado estas proponata pieda reveno tra la paŝtejoj, kiujn permesis malkovri la trajna alveturo. Tiuj senfina herbejoj, kie izolate kreskas grandaj abioj, memorigas al urbaj parkoj. Ili invitas, ĉu al sencela marŝado, ĉu al ripozo.

A.- Jen la programo de tut-taga stud-ekskurso, kiu estos proponata al la partoprenantoj al la kursoj de Internacia FERIA Atlernejo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!